*Eldonnombro 13 000*

# LA KOMERCO

Oficiala Bulteno de Komercista Esperanto-Unio
Centra Oficejo: Dresden/Radebeul, Friedrich-Auguststr. 4
Agentejoj en: Danzig, Funchal, Hvammstanga, Lawang, Lodz, Maur, Plauen, Recht, Valencia
La bulteno estas sendata al niaj agentoj kaj klientoj senpage, neklientoj kaj nekomercistoj povas aboni por RM 0.25 po numero. La bulteno aperas laŭbezone.

Numero 22 + Eldonita en junio 1935

## Nova servo de KEU: Fremdulvarbado.

Komerco kaj trafiko estas parencaj. Ni tial plivastigas nian programon kaj depost nun servos, krom al la internacia komerco, ankaŭ al la fremdula trafiko, disponigante lokon en „La Komerco" al urboj kaj porfremdulaj asocioj dezirantaj atentigi eksterlandanojn al la belaĵoj de siaj urboj kaj landoj. La relative alta eldonnombro de nia bulteno ebligas, konigi tian reklamon al multaj personoj, kiuj, kiel Esperantistoj, ja ĉiuj portas en si la deziron, vojaĝi kaj viziti fremdajn landojn. Por ebligi al multaj urboj tian reklamon, ni starigis specialan tarifon, kiun interesatoj bv. postuli. Por ke sur tiu nova agadkampo ni estu sukcesaj, kompreneble necesas, ke vi, estimataj legantoj, montru vian intereson kaj preferu la urbojn reklamintajn en „La Komerco", kaj ke vi petu prospektojn, gvidlibrojn kaj informojn.

Kun plezuro ni informas nian legantaron, ke la urbo Dresden faris la komencon per reklamo en la nuna numero, kaj tial ni elkore alvokas al niaj geamikoj la jam ofte por Dresden dissenditan devizon:

### Venu Dresdenon, koran bonvenon!

Speciale adresiĝas nia alvoko al la gesamideanoj vizitontaj la kongreson en Romo. La nordlandanoj reveturontaj al siaj hejmlandoj nepre haltu en Dresden por rigardi la belaĵojn de tiu unika urbo. Estos aranĝataj gvidadoj, kaj laŭeble KEU disponigos privataŭtomobilojn, por ke kun vera ĝojo kaj plezuro vi ĝuu la restadon. Ĝustatempe avizu vian alvenon!



*Germana populara ekpozicio por servo kontraŭ fajro kaj por savaranĝoj:*

*De 29-a de majo ĝis septembro 1935 Alloga kaj instrua.*





*Banloko de la sanatorioj — Klimata kuracloko dumjara.*

# Dresden

*La urbo de la muzeoj kaj mondfamaj kolektaĵejoj*

*La urbo de la teatra, muzika kaj bildanta artoj*

*La urbo de la mirinda ĉirkaŭaĵo (Saksa Svisujo, Dresdena „Erikejo", „Erc"-montaro)*

*Informojn kaj prospektojn postulu de: Verkehrsamt — Dresdner Verkehrsverein, Hauptbahnhof.*